

Sur la batalkampoj de Verdun kun Louis Pergaud

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 585/91-2, 1982 majo 20 kaj 22.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-91/SRI-1982-91-2-585-Claude-GACOND-Sur-la-batalkampoj-de-Verdun-kun-Louis-Pergaud.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Louis Pergaud, kies centjaran gubileon oni festas ĉijare, ne nur verkis la BUTONMILITON. Per leteroj, kiujn li ĉiutage sendis el la batalkampoj de Verdun, kie li pereis la 8-an de aprilo 1915, tridek-tri-jara, li fakte lasis eksterordinaran priskribon de la sentoj, kiuj animas soldaton. Jen hodiaŭ per citaĵoj el tiu korespondado, kiun esperantigis Roger Bernard ni konatiĝas kun la tranĉea vivo.

A.- La 4-an de oktobro 1914 Louis Pergaud por la unua fojo devis resti ekstere dum la nokto. Jen kiel li priskribas tiun aventuron en letero al sia edzino:

Cl.- "Mi pasigis mian unuan nokton sub arboj, en ŝirmejo el branĉoj, rapide starigita, kiun mi nun bele aranĝos, laŭ la arto akirita iam dum la tempo de la Butonmilito. Mi ne tro malbone tie troviĝis malgraŭ la nokta malvarmeto. La matraco estis ja iom malmola, kaj la soldatsako utilis kapkusene. Nenio pli pitoreska ol nia provizora instalaĵo, kun la bivaka fajro, kaj la kuirado farata en marmito pendigita inter du bastonoj. Tamen, akvo iom mankas; necesas ĝin de malproksime elpreni, kaj se ni havas por satige trinki, male, por lavi sin, fuŝ!

A.- La 8-an de oktobro Louis Pergaud notas en sia militkajero tiun ĉi emociigan tekston, kiu ekanoncas dubon pri la eblo eliri vivanta el la batalkampoj. Aŭdu:

Cl.- Kara edzineto, mi multe pensis pri vi ĉi-nokte, kaj ĉi-matene mi ne havas tempon por skribi, kaj tamen se mi devos kuŝi sur la batalkampoj, kie akros la lukto, mi nepre volas, ke vi sciu, ke ĉio plej bona en mia koro leviĝis al vi en tiu gravega momento. Mi deziras, ke vi ne pli multe timu, ol mi mem. Mi eĉ tion skribaĉas sub obushajlado, kaj mi eĉ ne levas la nazon por rigardi, kie ili eksplodas; estas vere, ke laŭ ĉiu fajfado oni tuj divenas, ĉu ĝi estos por ni, aŭ por la kamaradoj, ĉu antaŭe, ĉu malantaŭe. Jen, daŭras la afero, mi delasas la krajonon por la pafilo, kaj vivu Francujo !

A.- La 10-an de oktobro Louis Pergaud skribas al sia edzino:

"Hieraŭ mi sendis al vi nur poŝtkarton, kaj hodiaŭ mi ne havas sufiĉan tempon por skribi longe, ĉar ni nun okupas nin sendante "bombonojn" al la Sinjoroj Hunoj, kiuj cetere abunde inundo nin per ŝrapneloj sed sen inda rezultato. Eĉ ne haŭt-ŝiron mi ricevis. La dioj daŭre tiel ŝirmu min. Mi esperas, ke hodiaŭ estos malpli zorgige. Cetere jam de ses tagoj mi ne lavis min, kaj de tri tagoj ni havis nur hazardajn manĝojn. Feliĉe mi havis ian provizon... Tri noktojn ni kuŝis sur kampoj: estis ne varme, sed ĉiu el ni havas sian kovrilon, kaj plukante tie-tie kelkajn garbojn ni sukcesas estigi al ni allaseblan liton, kaj tiel ne tro multe malvarmi... Ho, mia eta, milito estas io ne bela, kaj kiel multe mi aspiras trovi mian labortablon kaj miajn librojn.

Cl.- La 12-an de oktobro Louis Pergaud ĉiam troviĝas je la unuaj vicoj. Jen citaĵo el letero al la edzino: "Nia pozicio estas neeltenebla, kaj ni retroiras ducent metrojn, malantaŭ kreston, daŭre artileri-pafitaj. Unu el ni mortis, tri plotonestroj (du oficiroj, el kiuj mia leŭtenanto) estis vunditaj, kaj sume ankaŭ kvindek tri soldatoj. Koncerne min, kvar perkutaj obusoj falis je kvin metroj, ĉiuflanke: antaŭe, malantaŭe, dekstre kaj maldekstre, kavigante profundajn truojn, kiuj min kovris per tero. Fuzaj obusoj eksplodis en tranĉeoj kaj super mia kapo. Estis

tiel eksterordinare vidi tiom da ŝtalo kaj da giso falanta ne atingante min, ke mi larĝbuŝe ridis, ne pensante eĉ dum sekundo ke iu splito povus atingi min. Cetere mi havis tuj alian farotaĵon, ĉar mia leŭtenanto estis vundita je la brako kaj femuro, kaj mi devis surpreni la komandon de la plotono por ĝin konduki ŝirme. Tie jam ne obusoj, sed kugloj. Se mi ne aŭdis dek apud mi, tiam eĉ ne unu mi aŭdis. Kaj neni ŝiro, sole truo en mia mantelo; kaj tamen mi jen staris, jen genuiĝis, por rigardi antaŭen, dum la soldatoj kuŝis. Ha! se mi devus fali, jam dudek fojojn mi estus mortinta. Ni fidu! mi kredas, ke la dioj estas kun ni.

A.- En siaj leteroj Louis Pergaud de tempo al tempo mencias heroajn agojn, kiel tiun ĉi priskribitaĵen en letero de la 22-a de oktobro: "Guilloneau citas al mi la kazon de rezervisto en Etain, kiu antaŭ Germano vundita kaj lamentanta, elpakis sian individuan pansaĵon kaj fleginte la homon reiris kure al sia kompanio.

Cl.- Samtage li skribas al amiko: "Rapide venu la paco, ĉar kuraĝo kaj eltenkapablo havas limojn; mi tamen volas ĝis la fino teni min...

A.- Kaj la naturadmiranto sin esprimas. Jen ekzemple citaĵo el letero de, la 5-a de novembro al la edzino: "Tiu tago de Ĉiuj-Sanktuloj estis adorinda: alaŭdoj kantis sub la suno, la sturnoj pasadis, la herbejo estis verda, flava kaj griza, perdrikoj ĉirkaŭe vokis. Kiel agrable estus kuradi tra kampoj, sen ĝenaĵoj, anstatataŭ restadi enkavigita kvazaŭ vulpo kiu tiam-tiam montras la nazon ekster sia truo.

Cl.- En tiu korespondado Louis Pergaud respondas al demandoj de la edzino. Jen ekzemple la 11-an de novembro kion li skribas: Dum mi estas ĉe tiu temo, mi satigos vian pravigendan scivolon virinan. En la tranĉeo, kie ni restadas 24 aŭ 25 horojn, ni kompreneble ne restas la tutan tempon ne pisante, ja. Sed jen la demando, se ni ekaperigas la nazon, paf! "bombonoj" impetas. Unu nia viro de la 1-a kompanio, kiu kredis, je la sesa matene, ke li povus eluzi la duon-mallumon por komplezi al necesajo, spertis sian pugtruon forportita de kuglo. Mi diras "truon", sed ĉefe ĉion ĉirkaŭan, kaj la kompatinda troviĝas en vere ne komforta stato.

A.- La 15-an de novembro li rakontas pri ĝojo: "Ni laŭeble ĝuas la sin prezentantajn ĝojojn: hodiaŭ en kastelo duondetruita de obusoj, ĉe la lumo de kandelo kiu malfacile reliefigis niajn malhelajn uniformojn, ni dum du horoj pianludis. Estis duontragike, duonkomike, kaj malgraŭ ĉio estiĝis io doloriga, kiu nin streĉis. Kiom da ruinoj, mia kara, kiom da ruinoj!

Cl.- Pri la ruinoj Louis Pergaud skribas la 18-an de novembro: "Ĉi povraj vilaĝoj el Mozo prezentas lamentindan aspekton: preskaŭ ĉiuj logantoj fuĝis de antaŭ la invado, forlasante siajn domojn nun okupitajn unuflanke de ni, aliflanke de la Hunoj. Ĉio estas ruinigita: ŝrankoj malfermitaj, kaj prirabitaj, mebloj dispecigitaj de obusoj, nun plu utilantaj kiel brulligno por kuiru niajn manĝaĵojn. Estas plorinde. En tiu malordo iras-venas kelkaj viroj, kelkaj virinoj, senhelpaj atestantoj de la ĝenerala ruiniĝo.... Sola, meze de la placo, la bronza statuo de Generalo Margueritte ankoraŭ staras sur sia piedestalo antaŭ la brulinta Urbdomo. Dio tamen scias, kiom da obusoj ili pafis al tiu celo, kiu ilin spitas. Ĉi-rilate provu do provizi min je la adreso de Paul Margeritte; mi sendos al li letereton por rakonti tiun aferon. Tio lin plezurigos.

A.- Sed la vintro alvenas, kaj kun ĝi la pluv- kaj neĝ-tempo. Pri tio ni legos al vi la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond legis leterojn de Louis Pergaud. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*